

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO
WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO.

REDAKTANTOJ
REDAKTORZY

PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI

APERAS LA 1^{ma} DE ĈIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20^a DE ĈIU MONATO.

ENKONDUKE DE LA REDAKCIO.

La tasko de redaktado de iu gazeto kelkfoje ne estas facila. Vole-ne-vole oni devas iufoje kontentigadi diversajn ambiciojn, ambicetojn, defendi sin kontraŭ lavango de „poemoj“, verkitaĵ de freŝbakistaj esp-istoj, trankviligadi tro temperamentplenajn verkistojn, kiuj eble eĉ pravas en siaj argumentoj, sed pro sia tro granda fervoro embarasigas la redaktanton. Kelktempe ni retenadis la fortan surprimon, meditante dume, kion fari: la argumentoj ŝajnas esti pravaj, la aŭtoroj sendube celas la bonon de nia Esp.-movado. Do ĉu ni rajtas silentigi la buŝon, kiu krias pro doloro? Ĉu ni rajtas „meti la lampon sub grenmezuri-

lon“? — Kaj ni ekvidis, ke ne! Ni cedis, enpresante tri artikolojn, verkitajn de plej eminentaj pollandaj esp-istoj.

Certe ni pli ĝojus, se ne estus bezono aperigi ilin, komplete forigi ian ajn politikon, kiel faris du plej gravaj Esp.-jurnaloj: „Esperanto“ de U. E. A. kaj laste ankaŭ „Ilroldo de Esp.“. Sendiskute tio estas plej bona, sed ni ne povis pretervidi la riproĉon de Germana Esp-isto, ke ni „fiinormas“, kial ĝi trovas respondon. Eventualan kritikon oni direktu al la aŭtoroj; ni povas nur servi kiel perantoj, por havigi al ili la skribaĵojn.

INTER NI.

La intensiĝo de naciismo en la mondo, kun Germanoj antaŭ ĉiuj la vojon montrantaj, komencas influi ankaŭ nian mondeton esperantistan. Tio ne estas tre grava por neesperantistoj, sed tiom pli devas tuŝi nin, interpacigan anaron, kiuj pretendas esti liberaj de nacia paŝiigo, kun kompreno kaj toleremo rigardantaj unuj aliajn, tiuj ĉi flanke de la landlimo la aliajn transe de ĝi sidantaj, tiuj a-lingve parolantaj la aliajn, kiujn parolas bo-lingve, tiuj blondrasaj la aliajn, brunulojn...

Ĉu estas eble miri, ke la potenca, 99%-ojn de la germana popolo nombranta neesperantistaro germanlanda silentigis la voĉeton apenaŭ aŭdeblan de

la unu sola por 100, esperanta idealisto?...

Kaj tamen. La esperanta „paca batalantaro“ en Germanujo faras ion absurdan, kruelan, nekompreneblan *incompatibilitatem*, predikante lingvon internacian, kia estas Esperanto al la hordoj de naci-aĉa sovinistaro. La grupoj de Dreseno kaj la aliaj, kion ili ideis, manifestante sian „samdirektiĝon“? La lingvon? Sed ja lingvo ne estas celo, sed rimedo. Sekve, la rimedon? Idealistoj de lingvo helpa akcelantaj rasan malmamon...!

Mi vin kondolencas elkore, kiuj, ne povinte liberiĝi de la amegata ideo Zamenhofa, ŝajne bruligis la lastan, kaj —

sub ŝirmo de naciecemo — nutras en vi mem la fajron de esperado, ke tamen ĉio ĉi pasos iam kaj reaperos la objektivaj cirkonstancoj, en kiuj Zamenhofa standardo la pura, senmakula, libere disruliĝos al la ekstero, kiel esprimo de la interna ideo. Sed ve, miloble ve al vi, kiuj ekpuŝite de la naci-aĉanaro nun mem kunpuŝas aliajn — en la nomo de Esperanto! Al tiuj mi vokas: lasu, demetu, foriĝu de la esperanta movado, ĉiu 46 jarojn baraktas ĝuste kontraŭ ĉia tronaciemo kontraŭ ĉia persekuto al proksimuloj, kaŭzita sole de ilia „fremdeco“, kontraŭ ĉia barbareco kaj malindeco. Se tio estas la celo de

venko de Esperanto, ke la mondo ĝis nun dividita en lingvajn apartaĵojn, nun posedu unu, komunan lingvon de — barbaroj, kial peni, kial labori?

La rezultoj de tia „samdirektiĝo“ jam montriĝas. En la nuna, nova laborsezo — la Dresena grupo komunikas per „Heroldo“, ke al ĝia kurso aliĝis — 9 (naŭ!) personoj...

Kiel vi argumentas nun en prelegoj pri Esperanto? Ke Esperanto servas al refuto de la terorinformoj? Via „samdirektiĝo“ estas la plej terura propagando kontraŭ via malfeliĉa lando...

Dr. Leopold Dreher.

La mondo atentu!

De I. Lejzerowicz.

Mjaj lastaj du artikoloj, aperintaj en „Pola Esperantisto“, elvokis tre fortan intereson en multaj esperanto-rondoj de en- kaj eksterlando. El diversaj landoj de Eŭropo, inkl. Germanujo, kaj Azio mi ricevis grandan nombron da leteroj, kies aŭtoroj ĉiuj senescepte esprimas sian aprobon kaj konsenton pri la ideoj de ni esprimitaj. Tiuj leteroj estas por mi vera kuraĝigo en mia decida batalo kontraŭ la hidro de barbareco, kiu lastatempe penas penetri ankaŭ nian movadon — ili pruvas al ni, ke ne ĉio jam estas perdita en la verda anaro, ke ekzistas ankoraŭ profundaj sentoj de humaneco kaj klara konscio de homeco inter la esperantistoj, kiuj — ni varme esperas tion — ne lasos fali la verdan standardon en momentoj tiom krizaj, kiel la nunaj.

Kiam ni antaŭ la kongreso en Kolonjo alarmis ĉe la instancoj de nia movado, atentigante je la kompromitego, kiu ninacas nin se la kongreso en Kolonjo okazos; kiam ni alarmis, ke universala kongreso ne povas okazi en lando, kie furiozas plej malnobla reakcio, vandaleco kaj barbareco — oni ne atentis niajn malesperajn vekiĝojn, sed kun cinika ignoro al la plej altaj devizoj de nia afero oni iris tamen al Kolonjo kaj „jubileis“ kun ĥruncemizaj verdsteluloj, kiuj en sangon kaj torturadon trempis siajn konsciencojn, se ne la manojn mem! Kaj longe la ideoj esperantistoj memoros tiun humiligon kaj profanon, kiun la zamenhofa movado devis suferi en Kolonjo, kie apud la altidea esperantista himno „La Espero“ estis kantata la teruron vekanta kanto de „Horst Wessel“, kiu provokas al murdado, al fajro kaj glavolo!

Sub kia preteksto niaj instancoj ne volis revoki la kongreson? Sub preteksto de t. n. neŭtraleco, sub preteksto, ke la esperantistoj de Germanujo ne devas suferi pro la reĝimo reganta en ilia lando, sub la preteksto de event. monperdoj, kiujn povas kaŭzi la neokazigo de la kongreso. Tio estas pretekstoj, kiel ni vidas, ŝajnaj kaj tute senkritikaj — ĉiuokaze nur pretekstoj, ĉar nun, post la kongreso, ni konvinkigis, kiom erarplena mispaŝo kaj kiom granda kompromito estis la okazigo de la kongreso en Hitlerlando.

Ni alarmis, ke tia neŭtraleco, kiu igas nin silenti pri kruelaĵoj, ke tia „neŭtraleco“, kiu permesas al ni „jubilei“ en lando, kie dekmiloj da niaj kunfratoj putras kaj pereas en koncentraciaj tendaroj, estas nenia neŭtraleco, estas falsa neŭtraleco, kaj tiaspeca agado de niaj ĉefaj instancoj donas definitivajn mortfrapon al nia vera sur zamenhofa ideologio bazita neŭtraleco. Rigardu bone kaj vi trovos, kian senreviĝon kaj apation rezultigis la Kolonja kongreso, aŭ pli ĝuste la fakto, ke niaj instancoj okazigis tie la kongreson, en rondoj de ideoj esperantistoj! Observu kaj vi konvinkigis, kian baton pro tio suferis nia movado ekstere, kie oni kun ignoro kaj abomeno sciigis pri la kongreso en Kolonjo. Se tio estas „neŭtraleco“, kiu ne permesas al ideoj esperantistoj reagi kontraŭ inkviziciaj teruraj, tiam — mi certigas vin, gvidantoj de Esperanto-movado — ke centoj, se ne miloj da veraj samideanoj definitive forlasos tiun ĉi „neŭtralan“ movadon, kun kiu ili volos havi neniom komunan.

Kiam ni, ideoj esperantistoj, alarmis antaŭ la kongreso, oni penis „kvieti-

gi" nin: Ne bruu tiel forte, sinjoroj, kion cetere kulpas la germanlandaj „esperantistoj“, kiuj sendube restis veraj zamenhofanoj kaj sendube ne respondecas pri la politiko de Germanujo? Kaj pluraj naivuloj kredis. Sed nun en la vizagxo de nia tuta movado, de tiuj, kiuj „jubileis“ en Kolonjo, mi kun doloro alkrias: oni cinike trompis nin! La „kora“ invito flanke de l' brunĉemizaj verdsteluloj estis mensogo fia kaj malmalnoblega hipokrito! La „samideana“ „neŭtraleco“ estas simpla blufol

Apenaŭ la kongreso finiĝis, la esperanto-grupoj en Germanujo estis reorganizataj „adaptataj“ al la nova reĝimo (gleichgeschaltet), kaj oni ekaplikis en Esperanto-grupoj la arĵan paraĝrafon! Kaj gvidanto de tia Germana Esperanto Asocio konsentis lariĝi ne iu alia ol la prezidinto de la lasta kongreso „Jubilea“, tiu, kiu antaŭ apenaŭ du monatoj estis la ĉefa reprezentanto de la Esperanto-afero, tiu, kiu antaŭ du monatoj tiel varme kaj kore invitis ĉiujn „senescepte“! Kion vi nun diras, sinjoro Karl Minor? Kion vi nun diras, sinjoro prezidanto Merchant? Ĉu vi nun jam kredas, ke Zamenhof ne rajtus hodiaŭ aparteni al Esperanto-grupo? Ĉu vi nun jam kredas, ke al tia jubilea kongreso Zamenhof, via Majstro, neniam estus povinta iri?!

Kaj nun tio, kio estas la plej cinika en la tuta afero, tio, kio vekis indignon kaj sanktan koleron en ĉiu homo, kiu vidis tion: la informa broŝuro pri la „Nova Germanlando“, kiun bonvolis traduki s-ro Behrendt, ĥa, ĥa! la prezidinto de la „kongreso“ en Kolonjo! La „informilo“ pri la tro granda nombro da judaj advokatoj, kuracistoj, artistoj kaj scienculoj en Germanujo, kiun informilon eldonis — ho ironio! — malnova esperanto-organizaĵo, la Unuiĝo de Instruistoj Esperantistaj en Saksujo! Tiuj du senhontaj dokumentoj, kiujn la brunĉemizaj verdsteluloj dissendis tra Esperantujon sub la flambrila krieganta titolo LA MONDO ATENTU! Kiu faris tion? Oficiala Esperanto-unuiĝo, kiu apartenas al la universala tutajaĵo de la movado! „Samideanoj“ pri kiuj ni ĝis hieraŭ havis la iluzion, ke ili estas bravaj kumbatalantoj por la Zamenhofaj idealoj! Ĉu tio estas neŭtraleco, sinjoro Merchant? Ĉu per tio oni volas rompi la murojn inter la popoloj? Nun — kiu estis prava?

Se tiujn broŝuraĵojn estus dissendinta s-ro Goebbels, nu — ni povus nur mordi la lipojn — li rajtas disponi pri

Esperanto. Sed ilin dissendis malnovaj Esperantistoj, oficiala persono de nia movado tradukis la dokumentojn, kaj oficiala Esperanto — unuiĝo dissendis ilin! Kaj niaj instancoj plue silentos, ĉu ne? Kaj niaj instancoj plue insistos: ne bruu tiel forte, sinjoroj, ni estas neŭtraluloj!

LA MONDO ATENTU! LA ESPERANTISTA MONDO ATENTU! LA ESPERANTISTA MONDO RESPONDU! Kiu publike kondamnos tiun humiligon, kiun oficiala esperanto-organizaĵo faras al tuta popolo, al tuta raso, kiu — kiel ili mem informas — havis tiel potencon influon en la scienco kaj arto de Germanujo, de lando glora de sia scienco kaj artokrea tradicio!? Kiu publike eldiros sian indignon — en nomo de la grandaj kaj altaj idealoj, kiujn la verda standardo reprezentas, en respekto al la granda Majstro, kiu al tiu raso apartenas — kiu publike eldiros sian indignon kaj koleron kontraŭ tio, ke Esperantistoj distretas kaj frakasas la honoron kaj dignon de tuta raso, kiu tiom da gloraj filoj donis al la germana nacio, kion la „informantoj“ mem cinike konfesas! Kiu vera idea esperantisto havos la kuraĝon publike deklari, ke li kun abomeno kaj indigno deturnas sin de tiaj „samideanoj“, kiuj trempas siajn konsciencojn en malnobla, fia malamo!

Kiam ni eldoloris nian proteston, ni klare substrekis, ke ne kontraŭ la germanan popolon ĝi estas direktita, sed kontraŭ la barbarajoj, kiujn ĉelkcent senrespondecaj individuoj (el kiuj cetere ne ĉiuj estas germanoj, eĉ unu, kaj la ĉefa, tute ne estas germano) faracas en Germanujo. Kaj ankau nun ni ne kulpigas la germanan nacion, kiu sole respekton vekas en ni pro sia malnova kultura tradicio, kaj kompaton pro la nunaj suferoj. Kaj tamen oni superkriis nin, ke ni ne estas sufiĉe „neŭtralaĵ“! Ni defendis la rajtojn de homeco, ni pledis por klara difino de esperanto-ideo, por respekto de nia afero. Ni indikis, ke „jubilea kongresado“ sub takto de Horst Wessel Lied estas terura profano al la plej noblaj idealoj de Zamenhof kaj nun LA MONDO ATENTU kiom pravaj ni estis! La urso elrampis el sia felo. Cinike trompitaj ni estas, trompitaj kaj perfiditaj!

Kiam venontan someron ni denove kunvenos en Stockholm kaj mi, filo de l' ĥie humiligata raso renkontos „samideanon“ en bruna ĉemizoj, kia povos esti la rilato inter ni ambaŭ? Kia povos esti la rilato de mi, idea esperantisto,

oferanta ĉiun sian korpovibron al aferoj de mondopaco kaj intergenta amo, al homo, kiu prikraĉis mian honoron? Kaj kia povos esti la rilato de ĉiu homo al

brunĉemiza estajo, mokanta la ideon de homeco, kaj distretanta la esencon de tiuj altaj devizaĵoj, en kies nomo ni en Stokholmo kunvenos?

NE RİPROĈU SPEGULON, SE ĜI MONTRAS NİGRULON.

Nia respondo al s-ro „gvidanto“ Behrendt.

Nia noto en novembro No (pg. 151) pri la „Gleichschaltung“ de la Esp.-movado en Germanujo kaŭzis laŭŝajne ĉagrenon al sinjoro Behrendt, nomata nun oficiale „gvidanto“ de Germana Esperanto-Asocio.

Sinjoro Behrendt, volante refuti nian informon pri naciaj kaj politikaj persekutoj interne de GEA asertas en decembro No de „Germ. Esp.“, ke efektive antaŭ la Kolonia ĉefkunveno de Germ. Esp. Asocio la proponita § 11 de la „Richtsätze für Gleichschaltung der Esp. Bewegung“ malpermesis al „nearjanoj, marksistoj kaj komunistoj“ la okupon de grupestro-postenoj. Plie konstatas la „gvidanto“, ke la § 11, akceptita de la ĉefkunveno en Köln, ne tenas tiun malpermeson.

Dirinte tion, sinjoro „gvidanto“ kun mieno de ofendita virgulino finas: „Ĉio alia estas mensogo. Kial Pola Esp. tiel fi-informas?“.

Nu, sinjoro Behrendt, la ekstergermanaj Esperantistoj he havas laŭleĝan devon blinde kredi eĉ al la „gvidanto“. Ni kredas nur al faktoj kaj tiuj tamen ne estas konformaj al viaj klarigoj.

Ni ĝojus konsideri vian refuton, kiel vekigon de via konscienco kaj ĝenon antaŭ la tutmonda Esperantistaro pro naciaj kaj politikaj malpermesoj, se ĝi estus konforma al la faktoj. Ni estus eĉ inklinaĵi admiri vian kuraĝon kontraŭstari al la nunaj potenculoj kaj danke notus, ke vi tamen restis fidela adepto de certa nearjano, naive pensinta pri ebleco ekstermi el homaj koroj la sentencan intergentan malamon.

Bedaŭrinde, vi preferis konscie kaŝi la veron kaj ruze elvoki falsan impreson pri la efektiva stato interne de la Asocio, havanta la plezuregon esti gvidata kaj komandata de via Moŝto.

Jes, la bela frazo estis forigita el la § 11 kaj vi formale „pravas“. Sed la kaŭzo de tiu forlaso estis la multnombraj kaj energiaj protestoj, alvenintaj el ĉiuj partoj de Germanujo. Germanaj Esperantistoj ja restas fidelaj anoj de nia granda rondo familia, kiun vane vi provas diskrevigi.

Vi cedis tiam, sinjoro „gvidanto“, sed permesu al ni ne senbaze supozi, ke via

cedemo devenis de tio, ke vi jam tiam havis la planon pri forigo de la t. n. „nearjanoj“, efektivigitan poste de vi malgraŭ la nova senkulpa teksto de la § 11.

Vi scias tro bone, kiel tio okazas. Sed por ebligi ankaŭ al aliaj homoj prijuĝi, per kiel nobla maniero vi faras tion, ni prenas la kuraĝon malkaŝi vian sekreton.

Laŭ la nova regularo Germana Esp. Asocio havas en apartaj lokoj individuajn membrojn, kiuj povas kuniĝi en grupo sub estrado de „Obmann“ (grupestro aŭ subgvidanto). Kandidato por tiu posteno estas proponata de la membroj al la „gvidanto“, kiu laŭ la §§ 2 kaj 7 de la famaj „Richtsätze“ memstare decidas pri tiu enoficigo kaj restas sole respondeca (antaŭ neniu!). Do, simple — la gvidanto Behrendt povas eknomi aŭ ne eknomi la proponitan kandidaton.

Kaj kiam — bonvolu atenti ĉiuj, krom s-ro Behrendt — grupo fondiĝas kaj proponas al la „gvidanto“ sian „Obmann“, la kandidato unue ricevas por subskribo paperon de GEA, enhavanta deklaron, ke li estas de pure arja deveno kaj ne simpatias al la marksistoj kaj tiel plu laŭ konata modelo.

Nur tiuj Obmann, kiuj subskribis tiajn belajn deklarojn, estis konfirmitaj de la „gvidanto“. Tiel do la t. n. „nearjanoj“ kompreneble ne estis konfirmitaj kaj estis fakte forigitaj de la postenoj. La freŝe nomitaj, „pursangaj“ grupoj ricevis kun la konfirma dokumento ankaŭ paperon kun komandordono denunci al la „gvidanto“ tiujn membrojn, kiuj iel montras, ke ili „simpatias“ al marksista partio.

Tiel do statas la aferoj maigraŭ la „refuto“ de sinjoro Behrendt, la nuna diktatoro de la Esp. movado en Germanujo.

Kiu do fiinformas, sinjoro gvidanto?

Kaj nun permesu ankoraŭ diri al vi, sinjoro Behrendt kelkajn vortojn, kiuj eble utilis al vi.

La vivo de honesta homo ne estas kovrita per rozoj. La vojo de batalanto por iu ajn nobla ideo des pli ne estas agrabla.

Ĉiu movado, ĉiu lando havas diversajn momentojn en sia vivo. La Esperanta movado havis jam diversloke tre malplezurigajn tempojn. Antaŭ la mondmilito pro aresto de la prezidanto Postnikov, suspektata pri spionado, la cara registaro de Ruslando fermis la Ruslandan Ligon Esp. kun ĉiuj ĝiaj filioj. La Esperantistoj estis en Ruslando, kiel ankaŭ en la tiam okupita parto de Polujo, konsiderataj kiel spiono, kontraŭŝtatoj ktp. Sed tio estis vidpunkto de ĝendarmoj. Neniu honeste pensanta homo, des pli Esperantisto, simpatiis kun tiuj persekutoj. Se la kondiĉoj de la reĝimo ne permesis laŭtan proteston, oni oficiale silentis. Sed neniu laŭdis.

Dum pli ol 120 jaroj Polujo suferis sub fremdaj potencoj. Oni volis forigi la polan lingvon, oni faris atencojn je polaj lernejoj, je pola historio, je ĉio. Sed la poloj ne malleviis la brakojn (nun, laŭ la recepto de la granda kaj malgranda gvidantoj, fotografita bele en No 8-9 de „Germ. Esp.“ sur paĝo 145, ili devus esti levintaj la brakojn), ne adorkaptis ĉiun vorton de la regantoj, ne opiniis plej sankta ĉiun drakonan ordonon. Ili protestis, kiam ili povis kaj eĉ kiam ili ne povis. Kiam neebla estis laŭta protesto, ili protestis per silento kaj daŭrigis sian laboron.

Neniu Esperantisto ekster Germanujo deziras enmiksi sin en la internan politikan vivon de tiu lando. Ne interesas nin, kiel Esperantistojn, ĉu la nuna Gvidanto de la lando de Goethe, Schiller kaj Heine, de Leibnitz kaj Einstein, de Berta von Suttner kaj Erich Remarque, faras ĝuste sian devon rilate al Germanujo. Sed interesas nin, ke niaj amikoj — germanaj Esperantistoj ne estu perfortataj de kelkaj perfidantoj de la sankta afero, dezirantaj fari personan karieron sur la ruinoj de germana Esperanto-movado.

La germana Esperantistaro en sia granda amaso restis fidela al la ideo de nia Majstro. Ĝi komprenas, ke ĉiutaga lingvo estas destinita por ĉiuj nacioj, ke estas neeble kunigi la puran ho-

maran ideon de Zamenhof kun la memfida, arogante malsaga kaj venena teorio pri plejsupereco de unu raso kaj de unu popolo.

La nuna situacio altrudis al niaj germanaj amikoj „gvidanton“, ordonantan al ili persekutadi iujn el sia medio pro tio, ke tiuj mem aŭ iliaj avinoj havas en siaj dokumentoj alian indikon pri religio, ol la „gvidanto“. La nuna situacio devigas la germanajn Esperantistojn akcepti de tiu „gvidanto“ ordonojn funkcii, kiel denunculoj kaj helpantoj de la sekreta polico.

Ni tre bedaŭras tion, sed ni plene komprenas la malfacilan situacion de niaj amikoj kaj ni neniel forigas ilin el la granda rondo familia, farata en konsento de la tutmonda Esperantistaro. Ni ne lasos malbonigi la reputacion de la fidelaj germanaj Esperantistoj malgraŭ la kondamnindaj provoj de Behrendtoj kaj Behrendtetoj.

Vane vi klopodas, sinjoro „gvidanto“ Behrendt. Vana estas via klopodo por ni, ĉar ni scias la veron kaj neniel kredos al vi, forstreinta vian tutan Esperantan pasintecon.

Vana estas ankaŭ via klopodo por via „Gvidanto“ Adolf Hitler, kiu ankaŭ neniel kredos vian plejhumsaman pensadon, ĉar estas ja li (aŭ Li, se plaĉas al vi), kiu sur paĝo 337 de sia libro kaj via biblio „Mein Kampf“ skribis laŭvorte:

„Solange der Jude nicht der Herr der anderen Völker geworden ist, muss er wohl oder übel deren Sprachen sprechen, sobald diese jedoch seine Knechte wären, hätten sie alle eine Universalsprache (z. B. Esperanto) zu lernen, so dass auch durch dieses Mittel das Judentum sie leichter beherrschen könnte“.

Kaj vi, sinjoro malgranda „gvidanto“, subulo de la granda „Gvidanto“, disvastigas Esperanton por jungi la germanan popolon en la sklavecon de judoj?

Cu vi ne hontas, purrasa juda servanto?

J. Shapiro.

Pensoj pri Arto.

La artisto estas la sopirvoĉo tera. Ju pli bone li komprenas pere de sia prezentformo alligi tiun voĉon al sopirkrio, des pli ĝenia estas la arto. Kiam arto estas voĉo de sopiro, tiam ĝi samtempe estas voĉo vokanta al progreso, kiu antaŭenpuŝas la vivevoluon. Per tio la ar-

tisto fariĝas propagandisto, poparte konscia aŭ malkonscia.

Oni povus dividi la diversajn artformojn en tri ĉeftipoj: Foje estas tiel, ke artaĵo estas kreita el konfliktagordo, konflikto inter artisto kaj la lin ĉirkaŭanta mondo. Tiu ĉi formo elefikas kiel

kritiko je tio, kio estas. La artisto vokas al siaj tempkunuloj: „Tiel vi estas!”

Aliffoje estiĝas artverko el amo al beleco, al harmonio. Ekz: Kiam homo kaptata de la beleco natura kapabligas formi ĉi tiun agordon al esprimo, ĉu estu per muziko, pentrado aŭ per poezio, ĉiam estas la kaŭzo, ke li la vidatan belecon komunikas al la kunvivantoj kaj volas esti komprenata de ili. Sed ne por interparoli aŭ amuzi ilin pro ilia enuo, sed li volas diri per tio: „Vidu tiom da beleco en la vivo, ĝoju pro la ĉeesto, ĉu ne valoras vivi? Vi nur jetu en la maron ĉion, kio vin malhelpas ĝui la belecon de la vivĝoj!”

La lasta formo estas komprenebla kiel konsekvenco, ĝi estas la voj- kaj celdirektanta formo, esprimata de homoj,

kiuj en ia sopiro al libereco kaj frateco kaj vera kulturo jam nun aliformigas ĉirilate laŭ ebleco sian vivon.

Per la faro ili servas al la kunvivantoj kiel modelo kaj vojjpreparanto por feliĉa kaj ĝoja ekzisto.

En mallongaj vortoj mi nun diros, kio estas arto?

Ĝi estas ĉi tio, kio povas enluli la homojn, kio helpas al ili rifuĝi por mallonga tempo el la realeco. Ĝi estas veneno por la progreso kaj efikas kiel morfino. La vera artisto pendolas inter natureco kaj realeco, kaj tiel longe, kiel ankoraŭ ekzistas vojoj gvidantaj el la banala realeco, li devas iri tiujn ĉi vojojn kiel artisto!

Erwin Grundmann, Dresden.

LUPO KAJ HOMO

de Gabrielo Wajzman.

La velurnigra, grandflugila aglo sidis sur arbo. Subite ĝi aŭdas: ŝu, ŝu. Rigardante malsupren, li jene vidas: leporeto-flavnazetulo kun paro da pintaj oreloj — saltas de loko al loko kaj sin kaŝas inter sekajn flavajn foliojn (tiel flavaj kiel la leporeto).

La aglo demandas de sur la arbo: leporeto-flavnazetulo kial vi tiel saltas kaj kiun vi timas?

Ekaŭdis la leporeto, kiel iu parolas, ĝi ekstaris — tremante de timo — sur malantaŭaj piedetoj. Ĝi pene spiris pro la timo kaj ĝi jam estas preta ree salti. Rigardante per siaj timiĝitaj okuloj dekstren kaj maldekstren, supren kaj malsupren, ĝi rimarkis la aglon sidantan sur arbo kaj nur tiam la leporeto elspiris profunde (ĉar la leporeto konas siajn malamikojn) kaj diris: Ĉu vi ne vidis vulpaĉon trakurantan la arbaron? Kaj krom vulpaĉo — vi opinias — re ekzistas pli da bestoj? Ĉu vi ne scias, ke plifortuloj formanĝas plimalfortulojn?

Aŭskultinte ĉion, la aglo ekridis kaj

komencas fanfaroni: al vi, leporeto, ĉiu povas multon suferigi kaj vin timigi, kaj al mi neniu povas fari malbonon.

Jene, la plej forta kaj la plej granda besto ekvolu fari al mi malbonon, tuj mi ekŝvebas sur miaj flugiloj kaj mi jam estas malproksime sub nuboj.

Dum tiu ĉi interparolo aperis de alia flanko de arbaro ĉiame malsata lupo.

Kaj la leporeto — lertsaltulo longene pensante — ŝu, ŝu, ŝu, en sian kaŝejon.

La fera aglo restinte sola de granda sopiro ekbalis per siaj grandaj velurnigraj flugiloj kaj jen ĝi estas preta al forflugo.

En tiu ĉi momento eksonis pafado de ĉasisto, kiu embuskis sub proksima arbo, kaj la aglo, trafita per kuglo, falis teren.

De bestoj ĝi povis antaŭgardi sin, de homo — ne. Kredeble malbona homo estas pli danĝera, ol plej malbona besto.

Elpoligis: Misiewicz.

JAPANA studento deziras korespondi kun Poloj. Certe respondas.

S-ro Dancuji-H., Osaka, Moriguĉi-ĉoo 692 (Japanujo).

Peto. La unuan fojon okazos esperanta ekspozicio en Palestino. Ĝi povas grave helpi nin en nia batalo por Esperanto. Ni petas la samideanojn, grupojn kaj eldonejojn sendi esperantaĵojn kaj propagandilojn al la adreso de nia delegito — P. Laĥovicki, ing., Kerem, Jerusalema.

Mi deziras korespondi. Certe respondos. G. B. Rust, 87 Glendale Avenue, Edgware, Middlesex. Anglujo.

EKSTERLANDAJ GESAMIDEANOJ!

Ĉu vi deziras geamikojn en Kanado kaj Usono? Multaj gesamideanoj ĉi tie ŝatus korespondi kun vi, Skribu al la Centra Oficejo de EANA, 1340 New York Ave., N. W. Washington, D. C., U. S. A.

La kaptita polo.*)

Gustavo Csegey.

Brile lumas la palac' de l' caro:
Muzik' sonas al pompa gastaro.
Orpokalo, en ĝi vin' perlanta...
Gaje sorbas la nektaron
Brava car' ruslanda.

„Hej, ĉi tago datreven' triumfal’
Kaj Paŭl' la car' ekstaras trinkonta.
La sinjoroj sen instig' aliĝis.
„Ja nuntage ĉe Macz'jovicz
Polland' mortfaliĝis”.

La sinjoroj ekkrias nun: „Vivul’
„Polan kaptitulon envenigu!
Nun korfrapas min gaja humoro,
Nun, la dekan de oktobro
Gratulu min, polol’”

Kaj aŭdinte la spritan ordonon.
Rid' ekkaptas nun ĉiun sinjoron.
Eĉ pro la rid' okuloj eklarmas...
Jen: kaptita pol' majeste
La ĉambron enpaŝas.

„Ĉi tien, pol'! Alpaŝu, brut' junal
Ĉu vi scias pri datreven' nuna?
Nun korfrapas min gaja humoro,
Nun, la dekan de oktobro,
Gratulu ĉi, polol’”

Kaptita pol', laŭ ordon' agonta,
Pokalprenas. Jen silento morta.
Dum lia larm' falas en la vinon,
Malkaŝas la palaj vangoj
De l' polo ruĝigon.

„Ja mi scias pri la nuna dato:
Datreven' de nia finbatalo.
Tiam mortis la patruj' de l' polo,
Do mi tostas pri vi feste,
Car' de sklavpopoloj!

La tradukinto estas simpatie konata al la pasinjaraj legantoj de P. E., kie li aperigis tre interesajn vojaĝskizojn el Polujo. Nun ni rememorigas lin, enpresante tiun ĉi tradukon, kaj observante ĉefe la enhavon, sen detala analizo de la forma flanko. Eĉ la proprajn nomojn ni restigis senŝanĝe, konservante tiujn laŭ la manuskripto.

La Red.

Vi disŝiris mian landon karan...
Sendu al vi punon Di' amaran!
Ĉiu ruso trenu la malbenon:
Estu almozul' de l' mondo,
Portu mem katenon!’

Nun ĉesas la ĝena lostparolo
Kaj la vinon eltrinkas la polo,
Pro koler' la cara vang' ruĝiĝas
Kaj da glavoj cent' minace,
Muĝe elingiĝas.

„Hm. Do dankon. Mi volas pripagi...
Nu ja, certe. Per rad' lin frakasi!
Nun certe bonhumor' min regas.
Kiel nomas oni ĉin, sklav'?!
Mi ja ne forgesas.”

„Apud Maczjejovicz, en batalon
Mi estris por atak' la polaron
La lando de l' poloj pri mi ploras...
„Ĉia nom' do: Koŝciusko!
Ĉu vi rememoras?”

Pro la glora nom' la car' ektremas,
Lian koron plu koler' ne premas.
La sinjoroj jam hontas la mokon:
Ŝercofendi de nacio
Plej larman doloron.

Sur la vangoj de l' car' hont' ruĝiĝas,
Al la pol' li pente proksimiĝas
Kaj manpremas lin kun paca koro:
„Iru, estu tuj libera,
Plej granda herool..”

El la hungara: Jozefo Mátyás
Debrecen, Hungarujo

*) En la hungara literaturo kaj polpoezio abunde troviĝas polrilataj poemoj, kantoj, romanoj, rakontoj, atestantaj la fratan simpatian kaj kunsenton de la hungararo al la pola nacio.

Tiu ĉi poemo estas verkita de Gustavo Csegey (1842—1925) teologia verkisto, poeto kaj romanverkisto. „La kaptita polo” („A fogoly lengyel”) estis kaj eĉ nun estas lia plej ŝate konata verko, kiun amkore dediĉas al la iam entombigita, sed nun tamen reviviĝinta polaro, kiel fratkoran saluton de la samsorta hungara nacio: la tradukinto

LETERO AL LA REDAKCIO.

Karaj Samideanoj!

En miajn manojn post longaj jaroj ĉalis decembra (1933) n-ro de „Pola Esperantisto“.

Mi opinias min ne rajta silenti pri miaj impresoj, kiujn naskis tiu ĉi kalendaro ĵen mi.

Ĝi (P. E.) ne aspektas tiel lukse, kiel iam. Multe ĝi estas pli modesta de ekstero, sed kiom ĝi fariĝis pli milda al ni — esperantistoj. „P. E.“ nun estas efektive organo de veraj esperantistoj. Bona, bonega stilo, kian povas (eĉ devas!) envii multaj el nunaj esperantistaj presorganoj. En tro riĉa, sed elektita enhavo, kia intereso ĉiun, kiu komencos legi kaj, mi estas certa, li ne ĉesos ĝis la lasta punkto.

Pro certaj cirkonstancoj mi ne estas pola civitano, (kvankam mi naskiĝis en

Polujo. Tie mi ricevis edukadon, tie kuŝas la mortcindroj de miaj gepatroj kaj fratoj, tie pasis mia ĵuneco), sed mia koro plene pleniĝis per ĵojo, ke nome tie, en la lando de nia Majstro, lando de mia pasinteco, kie antaŭ 30 jaroj mi konatiĝis kun Esperanto — ĝia interna Ideo-spirito, estas veraj esperantistoj. Esperantistoj (ne nur) laŭvicaj, sed starantaj en la kapumado de la Esperanto-batalantaro, honorindaj kaj honorigaj por ilia lando

Vivu kaj floru P. E.!

Bonvolu akcepti miajn plej sincerajn gratulojn okaze de alproksimiĝanta Nova Jaro kaj bondezirojn de sukceso kaj prospero.

Via tutkore kaj samideane

Vladimir Bodnarski.

Nice A. M.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

Eminentuloj - Esperantistoj. Al niaj samideanoj apartenas inter aliaj Princo Moŝto Karlo de Svedujo, kiu laste estis akceptata en Japanujo de Osaka Esperanto Societo, kaj edzino de Usona ambasadoro en Brukselo, kiu akceptis esp. delegacion kaj parolis kun ĝi en Esp.

Kongres-Karavanoj al 26-a en Stockholm. Jam nun ni scias, ke okazos karavanoj nederlanda, itala kaj germana. Tiun ĉi lastan aranĝas „Heroldo de Esperanto“.

Altranga vizito en la Internacia Esp.-Muzeo. En septembro vizitis la Vienan Muzeon la reganta princo Franc de Lichtenstein kun princino Elsa.

Esp. Radio-Servo por Eksterlando en Aŭstrio. La registara konsilanto Hugo Steiner sukcesis, ke esperantlingvaj radio — prelegoj pri Aŭstrio okazas ĉiun semajne, nome merkrede, ĉirkaŭ la 22-a.

Esperanto en lernejoj. La konsilantaro de la distrikto de Lyon kaj la urba konsilantaro de St. Etienne voĉdonis deziresprimon, ke la franca registaro enkonduku instruadon de Esperanto en la lernejoj.

Ni havas novan „plibonigon“ de Esperanto: „Nov-Esperanto“, kaj eĉ ĝian... „centran oficejon“, kiu ĵus eldonis: Antido: „Kompleta Fundamento de l' idio-mo „Mondial“ or „Nov-Esperanto“. Vere, s-ro R. de Saussure (versajne la „aŭtoro“) havas sufiĉe da tempo kaj... paciencon. Ni ĝin havas ankaŭ.

Esperanto-kurso por aktoroj de radio-stacio. La radio-stacio de Brno (Ĉeĥoslovakujo) aranĝis Esperanto-Kurson por siaj geaktoroj kaj geoficistoj, por havi kapablajn personojn por siaj Esperanto-lingvaj prezentoj.

La Internacia Kriminalkomisiono okupas sin pri Esperanto. La Internacia Kriminalkomisiono, kiu kunvenis fine de septembro en Vieno decidis starigi la demandon pri uzado de la internacia lingvo sur tagordo de la proksima kunveno, okazonta en printempo de 1934.

Esperanto en la nederlandaj poŝtoficjoj. La direkto de la nederlanda Poŝto-Telegrafo-Telefono ĵus fabrikigis metalajn tabulojn kun la surskribo: „Oni parolas Esperanton“. Tiuj tabuloj pendos de nun en la poŝtoficjoj ĉe ĉiu ĝiĉeto, kie deoras oficisto komprenanta la lingvon Esperanto. En Nederlando jam nun estas pluraj centoj da Esperante parolantaj poŝtoficistoj kaj granda nombro da geoficistoj nun lernas Esperanton en kursoj aranĝitaj speciale por poŝtistoj.

Priesperanta Internacia Konferenco 1934. Okazos la 20-24 de majo 1934, ne kiel estis antaŭe anoncote en Vieno kaj Budapeŝto, sed nur en Vieno. La preparajn laborojn por tiu konferenco financas la aŭstria ministerio por komerco kaj trafiko. Informojn pri la konferenco disaŭdigas ĉiutage Radio-Wien post la esperantlingva prelego.

Malbelaj aferiĉoj de Kola Ajayi? En 757-a numero de „Heroldo de Esperanto” Esperanta klubo Logatec en Drav-ska banovina (Jugoslavio) publikigas averton kontraŭ Kola Ajayi kaj iu Va-hen Damjan. La klubo akuzas ilin pro neredono de pruntedonita al ili iumbildaparato. Vahen estas fripono persekuta de la polico. — Tion ĉi ni notas pro la ĵurnalista devo je respondeco de la citita fonto.

XII-a Tutmonda Skolta Tendaro organizita de Skolta Esperantista Ligo (SEL) okazos en Slovaka Regiono sub montaro Tatry 16-an—31-a de julio 1934 sub

Ludmila Jevsejeva.

Disigo.

Domu manon kaj diru: „Adiaŭ!”
Pasis am', pasis nia printemp'...
Mi ne ploras, nur koro sanganta
Ekdoloras de tempo al temp'.

protektado de skoltaj, esperantistaj kaj ŝtataj eminentuloj. Ankaŭ skoltinoj kaj neŝkoltaj povas partopreni. Vivkostoj treege malaltaj. Informojn postulu de Esp. Fakoj de Centro de Slovakaj Katolikaj Skoltaj en Bratislava, Kapitulska Str. 18. Ĉeĥoslovakujo, kaj ĉe Pollanda SEL-repr. Emil Mayer, Kraków, Lelewela 9, m. 2.

Tutslava Skolta jamboreo en Kraków. Tutslava Skolta jamboreo kaj Tutpola Skolta Tendaro (25-jara jubileo) okazos dum aŭgusto 1935 en ĉirkaŭaĵo de Kraków.

Lastan fojon en kiŝo ni dronu,
Lastan fojon kunigu nin Di',
Poste falu kurteno, ĉar estos
Jam finita la amkomedi'!

Riga, 1. I. 34.

ESPERANTO-KURSOJ EN LA GAZETOJ.

En la nro 34 de „Czasopismo Spółdzielni Rolniczych” („Gazeto de Agrikult. Kooperativoj”) (Warszawa, ul. Wawerska 11-a) de la 1-a de decembro 1933 finiĝis la depost 1 jaro gvidata gazeta kurso de Esperanto por agrikulturaj kooperistoj, verkita de S-ro J. Zawada.

Premiojn por plej bona solvo de la fina ekzamena tasko ricevis: F-no Janina Skrzyńska, oficistino de la kreditkooperat. de Stefczyk en Garbalka, pow. Kozienice, S-ro Stanisław Urbano-wicz, Demidówka k/Dubna kaj S-ro Konstany Krywczyk, Orzew p. Klewań.

Koran gratulon!

„**PLOMYK**” („flameto”), la plej populara semajn gazeto por infanoj de 7—14 jaroj, eldonata de la Landa Asocio de

Polaj Papol- kaj Mez-lernejaj instruistoj en la nombro de 30000 ekzempleroj, komencis depost la nro 6 de la kuranta lerneja-jaro presigi en ĉiu nro lecionon de Esperanto, prilaboritan speciale por infanoj de la redaktoro de la „adreslibro de Pollandaj Esperantistoj”, S-ro J. Zawada. La ekinteresiĝo pri tiu kurso en la lernejoj estas tre vigla. La Redakcio intencas post la fino de l' kurso aperigi la lecionojn en aparta libreto.

Eksterlandaj esperantistoj, interesigataj pri kursoj por infanoj, estas petataj sendi gratuletojn al la Redakcio kaj peti specimenajn ekzemplerojn. Adreso: Redakcio de „Plomyk”, Warszawa, ul. Dobra 6. Polujo.

UNUA ESPERANTO SEMAJNO EN WARSZAWA.

Laŭ la krakova ekzemplo ĉiuj varsoviaj esp-istaj organizaĵoj post longaj malfacilaj antaŭlaboroj sukcesis organizi Unuan Esperantan Semajnon. La Organiza Komitato konsistis el: 1) Pola Esp. Societo, 2) Esp. Rondo de Pola Touring-Klubo, 3) Esp-ista Sekcio de Asocio de Pola Instruistaro, 4) Pola Sekcio de Tutmonda Ligo por Kriminal-kaj Policaferoj, 5) Pola Sekcio de T. E. K. A., 6) Esp. Sekcio de Ŝtata Instituto de Surdmutoj kaj Blinduloj, 7) Varsovia Esp. Societo, 8) Esp. Sekcio de Z. T. K., 9) Laborista Kultur-kleriga Insti-

tuto de St. Żeromski, 10) „Vitrzaj Domoj”, 11) Esp. Sekcio de Pola Sp. Ĥasko (P. K. O.), 12) Rondo de Esp. Tramvojoj, 13) Esp. Eldona Societo, 14) Varsovia Delegitaro de U. E. A., 15) Socialista Esp. Societo.

La Semajnon protektis S-ro Vojevodo WŁADYSŁAW JAROSZEWICZ. En Honora Komitato ĉeestis: Prof. dr. Odo Bujwid, Ministro dr. Aleksander Lednicki, Vicvojevodo J. Olpiński, Leo Belmont, Konsilanto Stefan Łoś, Direktoro Stefan Łopatto, Prof. dr. Paweł Kalina, Prezidanto de ĉefurbo Varsovio ing.

Zygmunt Stomiński, Prez. kpt. J. Silhan, Viceprez. de Varsovio Maurycy Mayzel, poeto Julian Tuwim, Parlamentano mjr. Edwin Wagner, red. S. Wagman, dr. Leon Zamenhof, Feliks Zamenhof, dr. Adam Zamenhof, dr. Zofja Zamenhof.

Dum la Esp-a Semajno aperis broŝuro pollingva sub tit.: „**Esperanto, lingvo internacia**“, en dekkelkaj miloj, sub redaktado de mgr. B. Strelczyk — ĉefred., Julian Jarecki, inĝ. Jan Kloc, red. de P. A. T. Antoni Pisarski, Halina Weinsteinówna, red. Jan Zawada kaj red. Oskar Berman. La broŝuro enhavis multajn bonajn artikolojn kaj prezentis valoran propagandan materialon.

La Semajno komenciĝis la 8. XII. 33. per Malferma Vespero en la Instituto de Żeromski laŭ jena programo: a) malfermo de dir. inĝ. Jan Skrzypiński, vicprez. de P. E. S., b) paroladoj de prof. dr. Odo Bujwid, Julian Jarecki (anstataŭ malsana Ministro dr. Aleksander Ledwicki), mgr. B. Strelczyk, inĝ. Engenjusz Rytenberg. Poste sekvis komuna fotografio kaj vizitado de Ekspozicio de esp. libro kaj gazetaro, kiun vizitis entute mil personoj. La Malferman Vesperon ĉeestis 500 personoj. En malfacila organizado de interasa kaj multvalora ekspozicio oni devas nepre substreki la agadon de s-oj Goldfarb kaj Góralczyk. Antaŭ kaj dum la Semajno okazis multaj prelegoj pri Esp. en Pola Touring-Klubo (23. XI.). Gimnazio por plenaĝuloj de Salinger (2. XII., danke al prof. mgr. A. Mirkowicz) en Varsovia Esp. Societo (10. XII.) en „Vitraj domoj“ (14. XII.). La prelegintoj: Dr. Janina Enderówna, Halina Weinsteinówna,

Julian Jarecki, red. Miecz. Guterma, I. Dratwer, adv. Józef Litaner kaj mgr. B. Strelczyk. Oni povas kalkuli, ke la nombro de aŭskultantoj dum ĉiuj prelegoj atingis mil kvincent personojn.

Jam sufiĉe longe antaŭ la Semajno varsovia gazetaro, dank' al energia laboro de red. Ant. Pisarski en P. A. T., publikigis notojn aŭ artikolojn pri Esp-o. Mirinde, ke la gazetoj, kiuj antaŭe rifuzis lokigon de notetoj pri nia lingvo, dum la Semajno estis varbitaj por nia afero. En la vico, sufiĉe longa, de varsoviaj gazetoj, kiuj propagandis la Semajnon aŭ Esp-on, estas tiaj, kiel: Kurjer Warszawski, Gazeta Polska, Kurjer Poranny, Robotnik, Kurjer Polski, Express Poranny, Nasz Przegląd, Kurjer Czerwony, 5-ta rano, Świat, Moment, Esperanto dla wszystkich, Głos Nauczycielski, Turysta i Auto ktp.

Resumante la supre cititan, ni veras al konkludo, ke la Unua Esperanta Semajno en Varsovio, kvankam ankaŭ ne ideala, plenumis tamen sian taskon cum laude. Multajn varmajn dankojn estas necese esprimi al ĉiuj tiuj niaj samideanoj, kiuj sindone oferis sin al alta laboro, nome al gesinjoroj: Halina Weinsteinówna, Tadeusz Szwajs, Julian Jarecki, Jan Zawada, Engenjusz Rytenberg, Henryk Krawczyk, Aleksander Hartman, Garbar, Goldfarb, Góralczyk, Oskar Berman, Mieczysław Guterma kaj multaj aliaj.

Specialan nian dankon ni sendas al nia Altŝatata Gvidanto prof. dr. Odo Bujwid, kiu bonvolis alveturi Varsovon kaj afable partopreni dum la Malferma Vespero.

A. B.

La Leipzig-a Foiro.

Du fojojn en ĉiu jaro, komence de marto kaj fine de aŭgusto, en la malnova foirurbo Leipzig kunvenas 120.000 ĝis 160.000 aĉetantoj el la tuta mondo, por ekkoni ĉi tie la produktojn de ĉiuj landoj kaj por aĉeti. Rondcifere 8.000 firmoj en ĉiu foiro ekspozicias siajn produktajn.

Ankaŭ la venonta Leipzig-a Printempa Foiro, kiu okazos de la 4-a ĝis 11-a de marto 1934, tre verŝajne estos vizitata de aĉetantoj el pli ol 50 landoj de la mondo, tiel ke ĉiu aĉetanto povos koniĝi objekte kaj precipe ankaŭ komplete kun la tuto de l' varofertoj de la mondproduktado. La Leipzig-a Foiro do estas por ĉiu serioza aĉetanto unika okazo por orientiĝo. La vizitanto de la Foiro vidas antaŭ si ofertata la tuton

de la varoj, kiuj interesas lin, kaj li povas detale kaj trankvile ekzameni.

La specimenfoiro hejmas en 31 palacoj de la urbkerno de Leipzig kaj estos en printempo 1934 jene dividita laŭ branĉoj: Vitro, porcelano, fajencoj kaj argilajoj; ĉambraj kaj kuiraj loĝoj; metalajoj; ludiloj; sportartikloj; muzikinstrumentoj; ledajoj kaj vojaĝartikloj; merceraĵoj kaj galanteriaĵoj; horloĝoj; valormetalajoj kaj juvelornamajoj; fotografiaj, kinematografiaj kaj optikaj artikloj; lampoj; arto kaj armetio; nebuloj kaj kanmebloj; paperajoj, bildoj, libroj, kontorartikloj, kontormaŝinoj; pakumajoj kaj reklamo; teksaĵoj; sukerajoj, nutraĵoj kaj ĝumangaĵoj; kemiaj, farmaciaj kaj kosmetikaj artikloj.

OFICIALA BILANCO

DE LA VI-a TUTPOLA KONGRESO DE ESPERANTO

ENSPEZOJ.

KONGRES-KARTOJ:

125 Ordinaraĵ po	5.—	625.—
4 Subtenantaĵ	10.—	40.—
1 Subtenanta	20.—	20.—
75 Rabataĵ po	3.—	225.—
13 Senpagaj (Nroj: 47,48		
	65,66	
	137,138	
	188,189	
	190,196	
	204,205	
	216.	—.—
13 Ne eldonitaj (Nroj:		
87 ĝis 99)	—.—	—.—
3 Nuligitaj (Nroj:		
120, 134, 135)	—.—	—.—
234 Kongreskartoĵ por la		
sumo de		910.—
Donacoj: N. N.	30.—	
Edvardo Wiesenfeld	5.—	
Inĝ. J. Skrzypiński	10.—	45.—
Balo (Venditaj biletoj)	102.—	
Donacoj	160.—	262.—

1217.—

ELSPEZOJ

P. K. O. (presajoj)		18.—
Presajoj: Aliĝiloj	17.—	
Leter papero	9.—	
Kovertoj	8.—	
Programoj	9.—	
Invit-biletoj	35.—	
Balaj biletoj	16.50	
Kongres - kartoĵ		
& fervoj rabatiloj	19.—	
Aliaj	13.50	127.—
Komunikajoj (multobligitaj		
per Gestetner'ilo)	22.—	
Stampiloj (du)	5.70	
Enkasigado	7.50	
Redakciaj elspezoj	4.15	
Tabulo (de Grabowski)	200.—	
Reprezentaj elspezoj	15.—	254.35
Magistrato: Stamp-markoj	3.10	
Balo (imposto		
& formalajoj)	20.06	
Salono (Kon-		
gresejo)	140.—	
Noktejoj	40.—	
Aliaj	21.84	225.—
Insigno (de l' Kongreso)	35.—	
Flor krono	50.—	
Balo (orkestro, artistoj ktp)	250.—	
Telegramoj (al Prezidanto		
de la Respubliko, al		
Marsalo Piłsudski kaj		
Cefministro J. Jędrze-		
jewicz)	5.—	
Trink mono	21.—	361.—
Sekretarieĵaj kaj poŝtaj		
elspezoj	229.95	
Neta PROFITO	1.70	231.65
		<u>1217.—</u>

Ni reviziis tutan dokumentaron kaj trovis ĉion en perfekta ordo.

PROTOKOLO DE LA REVIZIA KOMISIONO:

- (—) Leo Belmont.
- (—) Kazimiro Zajaczkowski.
- (—) J. Skrzypiński.
- (—) Dr. W. Róbin.

Warszawa, 24. VI. 1933 r.

Por la aŭtentikeco: Edv. WIESENFELD
Kasisto de la VI Tutpola Kon-
greso de Esperanto en Varso-
vio, 3—5 VI. 33.

INTERNACIA KONKURSO POR LA JUNULARO.

„Kristo kaj la Universala Frateco“.

Dank' al la bonvolo de amerika kristanino, amikino de paco, S-ino Van Loan de Babylon (Usono) estas kreita fondaĵo, kiu aranĝas konkurson kun temo: „Kristo kaj la Universala Frateco“. Ĝia celo estas helpi al la plivastigo de la paca spirito de internacia amikeco inter la junularo.

La konkurso organizas la Junulara Komisiono (fako de la „Universal Christian Council for Life and Work“ kaj la „World Alliance for Promoting Friendship through the Churches“).

Rajtas partopreni gejunuloj loĝantaj

en Eŭropo kaj naskitaj post la 30-a de aprilo 1914 kaj antaŭ la 1-a de majo 1920. Teksto en kiu ajn lingvo. La ĵuĝantoj (el diversaj nacioj kaj eklezioj) disdonos pli ol 150 premiojn, el kiuj:

unua 300 usonaj dolaroj,

dua 200 „ „ k. t. pl.

Detalaj informoj estas riceveblaj senpage pere de la Junulara Komisiono: Case-Postale Nr. 46, Eaux-Vives, Geneve (Svislando). Bonvolu diri, ĉu oni deziras ilin en Esperanto, franca, angla aŭ germana lingvoj.

POSTKONGRESO EN TALLINN (ESTONIO) 12—14 VIII. 1934.

Esperanto-Asocio de Estonio decidis profiti de tio, ke Estonio situas proksime al Stockholm, kaj aranĝas de la 12—14 VIII. 1934 post la 26-Universala Kongreso, Postkongreso en Tallinn (Reval), la ĉefurbo de Estonio. La partoprenantoj vizitos la vidindaĵojn de la urbo kaj konatiĝos kun la estona kulturo.

La malgranda Estonio, tre simpatia balta lando, dank' al Esperanto jam tiel konata al ni, atendas la internaciajn gastojn kaj esperas, ke la tagoj pasigitaj en Estonio apartenos al la plej aĝrablaj en ĉia vivo.

La kongreskotizo estas 3 svisaj fr. Ĉiajn informojn donas Esperanto Asocio de Estonio, Tallinn, postkast 6, Estonio.

D I S T R A Ĵ O J

II. ENIGMOKONKURSO.

La 22 de januaro en la ejo de „Societo Esperanto“, Kraków, Smoleńsk 9 je 8 vesp. okazis lotumado de la II. Enigmokonkurso. Estis allasitaj ĉiuj, kiuj atingis minimume 12 punktojn.

La lotumado donis jenar rezulton: 1-a premio: Hans Hazenfuss (Riga) — 2-a premio: Ing. Chmieliński (Nowogródek) — 3-a premio: Wincenty Łabuz (Wieliczka).

Solve de enigmo nro 5: Serĝento, Paŝtilaristo, Komisario.

Solve de enigmo nro 6: Koridoro, Komodo, Kolorado (en decembra numero enstelis sin preseraro; devis esti „ivero en Ameriko“ kaj ne „en Afriko“).

Solve de enigmo nro 7: Presisto, Lektorino, Ĵurnalisto (en lasta numero okazis preseraro; devis esti „sinĵorino“ kaj ne „sinĵoro“).

Solve de enigmo nro 8: Kanto, Karlo, Korto, Torto, Torĉo.

KURACISTOJ.

Advokato: Vi ne devas tro ĉagreniĝi pri la morto de via unua paciento, kara doktoro!

Kuracisto: Estas facile tion konsili, sed malfacile ĝin plenumi.

Advokato: Nu nu, mia unua kliento ankaŭ sidas en malliberejo.

„Kiom da malsanuloj mortis?“ demandas matene la ĉefkuracisto la fratulinon.

„Sep.“

„Sep? Mi ja receptis medicinon por ok!“

„Jes, unu ne volis preni ĝin“.

„Hodiaŭ mi spertis ĉe la dentkuracisto grandan ĝojon.“

„Ĝojon ĉe la dentkuracisto?“

„Jes! Imagu — kiam mi eniris, mia pli frua dentkuracisto estis sidanta sur la seĝo kaj estis operaciata ĉe la dentoj.“

Aŭguristino: La kartoj aŭguras bone por vi — en via tuta medio neniu estos malsana.

Vizitanto: Ho ve, mi estas komencanta kuracistol

RECENZOJ.

EINAR DAHL: Huru leder man fort-sättningskurser i Esperanto? (Kiel oni gvidas daŭrigajn kursojn en Esperanto?) Gvidilo por studgvidantoj. Numero 1 en la serio: Helplibroj de Sveda Esperanto-Federacio. Eldonis Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 40 paĝ., 12x18,5 cm. Prezo: sved. kr. 1:—.

Sveda Esperanto-Federacio komencis eldoniĝi serion de praktikaj helplibroj por la organiza laboro. La unua libro pritraktas la organizon kaj la gvidon de daŭrigaj kursoj. Tiaj kursoj ofte ne havas la sukceson deziratan kaj tre ofte okazas, ke post fino de multnombre vizitata kurso por komencantoj ne multaj kursanoj daŭrigas la studadon kaj sufiĉe ellernas la lingvon. Bone organizitaj kaj lerte gvidataj daŭrigaj kursoj havas tre grandan signifon por la konstanta progreso de nia movado.

Ĉar la organizo de kursoj varias laŭ la landoj la libro estas verkita en la sveda lingvo.

La librojn de la serio rajtas aĉeti je duona prezo la anoj de Sveda Esperanto-Federacio. Sendube la starigo de tiu serio montriĝos tre valora por la Federacio el pli ol unu vidpunkto.

F. Azorin, arkitekto — Universala Terminologio de la Arkitekturo (Arkeologio, arto, konstruo k. metio), 215 pĝ. Prezo ne indikita. La verko, presita sur luksa papero, enhavas klarigojn de ĉ. 2.000 profesiaj vortoj, ilian etimologion, iliajn tradukojn en 6—8 naciaj lingvoj kaj multajn milojn da derivaĵoj. Ĝi enhavas ankaŭ 2.000 desegnojn, kiuj eĉ pli bone klarigas la fakterminojn kaj tiuj donas al la libro speciale gravan valoron. Ĉiu arkitekto trovos en la verko bezonatan terminon, klarigitan per vorto kaj bildo. Mi povas prave aserti, ke la libro de ark. Azorin estas — ĉe la Esperanta Teknika Medicina Vortaro de dro Briquet — la plej kompleta kaj taŭga fakvortaro. Presita ĉe Chulilla y Angel, Torrecilla Del Leal 17, Madrid.

La vojaĝoj de Gulivero — unua parto: Al Liliputlando. Tradukis: S-o Jos. A. de Roos. Ĉiu ja bone konas la malnovan rakonton pri Gulivero. Sed kiu el ni, plenaĝaj, ne tralegos kun plezuro ankoraŭfoje la aventurojn de Gulivero — en nia Esperanto?! Prezo 1.25 hol. fl. Eldonejo Piet Smits, Korvelsche weg 85, Tilburg, Nederlando.

SELMA LAGERLÖF: La infanoj de Betlehem. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. Prezo: sved. kr. 0.75.

Unu el la plej alte taksataj verkoj de la sveda verkistino Selma Lagerlöf estas Kristlegendoj. Ĉar la sveda esperanto-eldonejo havas la intencon en la unua vico eldoni kelkajn aliajn el ŝiaj verkoj, ĝi elektis unu el la plej belaj legendoj kaj aperigis ĝin aparte.

La infanoj de Betlehem estas delikata kaj kortuŝa rakonto pri la venko de bono super malbono.

Einar Dahl: Dialogoj kaj komedietoj. Eldonis: Eldona Societo Esperanta, Stockholm 1. Prezo: sved. kr. 0.50. 31 pĝ. Interesaj dialogoj kaj ĝajaj komedietoj amuzigas la leganton. Tre simpla kaj facila stilo ebligas la legadon eĉ al komencantoj. La libreto rekomendinda.

Jakób Rosenberg: Societa ludaro por hejmo kaj ekskurso. 46 pĝ. Eld. la aŭtoro: Hollandi 11—4. Tallinn, Estonio. Prezo sv. fr. 0.60.

Salutinda eldonajo por ĉiuj Esper. grupoj aŭ rondoj! Kvankam maldika, la libreto enhavas abundan materialon por fari la grupvesperojn, ekskursojn ktp. interesaj kaj ĝajaj. La lingvo estas klara kaj komprenebla. Do, grupoj kaj rondoj perfektigu viajn anojn por ĝaja ludado!

Utiligu la okazon.

LoKo.

SŁOWNIK JĘZYKA ESPERANTO de M. Guterman.

Mi rimarkis en nia organo nur kelkajn laŭdajn vortojn pri tiu verko, sed ĝis nun ne trovis iom pli detalan kaj seriozan kritikon. Ŝajnas al mi, ke tia verko tion meritas. Tial mi permesas al mi fari nun. Mi tuj diras, ke miaj diroj ne povas elĉerpi ĉion pri tiu verko: nek mallaŭdojn nek laŭdojn. Konstanta uzado povos doni ankoraŭ multe al pripenso.

Tiu vortaro konsistas el tri partoj I. *Gramatyka i słowotwórstwo*. Ĉu ĝenerale tiu parto estis necesa en vortaro? Mi ne kredas. Mi pli volonte vidus la duan parton pliampleksigitan per tiuj 38 paĝoj, kiujn oni trovas en ĉiu lernolibro. Mi pro tio trafoliumas ĝin rapide atentigante nur ke: mi estis skribita = *byłem napisany* kaj ne: *byłem był napisany*. Paĝo XX: krampo = [], paren-tezoj = (); sur paĝo XXXIV, tre gravaj eraroj: malplej bela tute ne *najbrzydszy* (= plej malbela) sed *najmniej ładny!* Same malpli bela ne *brzydszy* sed *mniej ładny*. La diferencoj estas ja tre grandaj!

II. Słownik polsko-esperancki.

Generala impresio: la vortaristo faris ĝin atente, kritikeme kun amo al la pola lingvo. Estas multa progreso kompare al tiu de Grabowski. Ĝi estas pli riĉa, multe pli riĉa je sinonimoj. Tamen la vortaro ne ĉiam estas samampleksa. Kelkaj literoj (g, h, i, j, k, m) estas ne-proporcie pli kompletaj ol la ceteraj.

Cu mankas necesaj vortoj, tion oni konstatas uzante la vortaron. Mi serĉis kaj ne trovis: pasaĝ (muzycznv), strzyga, patena, patoka, standaryzacia, rozgwar, finezia, poczucie, konwencjonalizm, dobrodziejstwo, najmniej, najwiecej (dume oni trovas: najlepszy) przykucnać, przykuwać, łoz(in)a, transpozycja, odprężać, samotność, Boże Ciało, rymarstwo, monotonja, godzić (szluząc), kooperatywa, koordynacja, nawiązać (roz-mowę), kooperacja, ischjatyk, przydzie-lić, przebierać się ktp. ktp.

Mankas entute parolturnoj, pri tio devus pensi la aŭtoro por la dua eldono.

III. Słownik esperancko-polski.

aldono de tiu vortareto ŝajnas al mi ankau tute neutila. Pli bone estus eventuale meti geografiajn kaj proprajn nomojn en la vortaron.

Jen mallonga, seka kritiko. Cu mi elĉerpis ĉiujn, certe ne. Spite tiu kritiko, spite la viditaj mankoj, la vortaro estas tre bona verko; ĝi estas la plej bona pola-esperanta vortaro kaj mi volonte diras, ke ĝi pro la diligenta kaj atenta laboro de la aŭtoro, okupas bonan lokon inter la naciaj esperantaj vortaroj. La aŭtoro evitis multajn erarojn, kiujn mi konstatis en aliaj similspecaj verkoj. Kun plezuro mi rangas ĝin apud alia bona nacia vortaro, tiu de Benemann. Kaj mi konstatas, ke ili amike kaj kamarade rigardas unu la alian...

S. Grenkamp.

Esperanto — la plej taŭga traduklingvo.

Kontraŭuloj de esperanto (la plej danĝeraj-konantaj ĝin iom) riproĉas ofte la internacian lingvon, esti malkapabla speguli traduke lingvajn belajn de originala literaturo. Ili estas nur tiam pravaj, kiam iliaj riproĉparoloj koncernas verkojn skribitajn en popularaj idiomoj. Ekz. montaranaj noveloj de Tietmayer aŭ Orkan kun ilia speciala kerneca kaj sukhava stilo restos (malgrati ĉiuj ĉi direkte noblaj provoj) por ĉiam Sezamo ferma al tiuj, al kiuj fremda estas lingvo de l' pola popolo.

Sed estimataj riproĉuloj, nekredemaj Tomasoj, ĉu oni povus senpune vesti ĉi infanojn de l' montaro en francan, germanan aŭ anglan veston? Centfoje nel Sed ni ne forgesu, ke tiuspecaj verkoj estas nur ereto de nacia literaturo. La tutajo de ĝi estas bonege tradukebla en Zamenhofan lingvon. Esperanto povas ludi, dank' al sia vortriĉeco kaj flekse-

bleco, rolon de spegulego, en kiu ĉiuliteraturo nacia vidas sian propran, kvankam nur spegulitan, vizaĝon. Estus eĉ rimarkinde dum tradukado de originalaj verkoj konservi kiel eble plej (en limoj de l' „Fundamento de esperanto“) la stilon de koncerna aŭtoro kun ĝiaj tipaĵoj kaj strangajoj, por ke reniu juvelo de ĝi perdiĝu kaj por ke la imago de legantaro pri valoroj de la verko estu la ĝusta. Ke Esperanto estas pleje kaj plene taŭga por ĉi celo pravas fakto, ke pli facile estas traduki (por tradukisto, ne lernanto) el nacia lingvo en internacian el kontraŭe. Nome en unua kazo estas ebla preskaŭ laŭvorta traduko, sen malutilo al esperanta bonstilo, kaj en la dua ni devas tro multloke eviti laŭvortecon de Esperantaĵoj. Mi atentigas tamen, ke ĉi rimarkoj temas prozon ne poezion.

Lena.

Dolora mortobato trafis la Ĉeidelegiton por Polujo, s-on J. Szapiro en Białystok. La morto forrabis de Li kaj de Lia edzino la 23. I. 1934. amatan, 1-jaran fileton, Adamon. Ni esprimas al nia s-ano Szapiro kaj Lia edzino nian plej profundan kompaton.

Redakcio kaj Administracio.

ATENTUI

Abonantoj de „Pola Esperantisto“ povas aboni la estonan „Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio“ aŭ la latvan „Ondo de Daugava“ jare por zl. 2.20. Nombro limita. Konto PKO. 406.660.

GRAVA SCHIGO POR ĈIUJ

La lasta templimo por ricevi premiojn por frupago al U. E. A. estas la 28. II. 1934. Estas konsentataj 100 li-bropremioj.

ĈU VI

FINPAGIS LA ABONON POR J. 1933?

REABONU POR J. 1934!



TEATRO KAJ FILMO



Ilustrowany Kurjer Codzienny

11. XII. 1933. Nr. 343:

La unua pola mallongmetra filmo en naturkoloroj.

En la „Eksperimenta Laboratorio „Szczepanik — Film“ en Warszawa okazis treege interesa monro de revelacia eltrovo en la kinematografia fako. Nome en la ĉeesto de reprezentantoj el la gazetaro, de mondo artistaj kaj literaturistaj estis lumigata pola filmo mallongmetra — en koloroj naturaj — turnata laŭ sistemo de Szczepanik.

Tiu-ĉi filmo donas la trarigardon de plej belaj specimenoj de bestoj trovigitaj en la varŝava zoologia ĝardeno — en la tuta riĉeco de iliaj koloroj. La centprocente fidelaj koloroj pliifortigas rimarkinde la plastikecon de fotografaĵoj. Precipe belaj sukcesis la bildoj de cigno, teknike malfacilaj pro la blanka koloro de la plumaro de tiuj belaj birdoj — delikate nuancita per la refleksoj de akvo. La papagoj ekbrilis per la plena lukso de ilia koloraro. Tre interesigaj estas la bildoj de blankaj kaj brunaj ursoj, zebuoj, cervoj, pavianoj, elefantoj...

La fotografadon prizorgis la amiko kaj kunlaboranto de Szczepanik: Franciszek Ozga. Kiel sciata Jan Szczepanik ĝis la jaro 1914 — kiam li mortis — labbris ĉe nova sistemo de kolora kinematografio. Post la morto de Jan

Szczepanik lia filo Zbigniew kontinuas la plujn teknikajn laborojn ĉe tiu signifplena eltrovo.

Lastajare en Lwów kaj poste en Warszawa antaŭ la rondo de kelkaj apenaŭ personoj okazis la unuaj provoj kaj elmontroj de filmo kolora. Dum daŭro de kuranta jaro la eltrovo estas rimarkinde perfektigita kaj la filmo „Zoologia Ĝardeno en Warszawa“ prezentas jam tre seriozajn rezultojn.

Tiu-ĉi filmo estis prezentata la 16 de decembro k. j. dum la ĉeesto de Lia Moŝto Sinjoro Prezidanto de la Respubliko dum la malfermo de Muzeo por Tekniko kaj Industrio en Warszawa.

Transkribis Józef Orzech.

ĈU VI SCIAS, KE...

...Fama filmproduktejo „Universal“ finis pollingvan filmon kun Konrad Tom kaj Władysław Walter s. t. „Li amas... li ŝatas... li respektas...“

...La samaj artistoj ludas ĉefan rolon el gaja soldata komedio s. t. „Parado de rezervistoj“.

...Reĝ. Waszyński fimpertigas filmon kun Eugeniusz Bodo s. t. „Kantisto de Varsovio“.

...En Varsovio ekestis produktejo de desegnaj filmoj, kiuj prilaboros nur polajn temojn. Kiel uruan filmon ni ekvidos „Sinjoro Twardowski“ laŭ konata verso de Mickiewicz.

POLLANDA KRONIKO.

Warszawa. 23. XI. 1933 en tre bela ejo de Pola Turing Klubo okazis „Esperanta Vespere“, kiun aranĝis la nove fondita Esperanta Rondo ĉe Pola Turing Klubo. Malfermis la „Vesperon“ inĝ. Wiesław Modzelewski, prezidanto de P. T. K., parol's poste Dr. Wilhelm Robin pri grava antaŭenpaŝo en turistaj sferoj nome pri fono de Esperanta Rondo. Li menciis, ke P. T. K. komprenis la gravecon de unu helplingvo Esperanto kaj nun P. T. K. kaj ĝia Esperanta Rondo laboros kune por Esperanto kaj propagando de Polujo pere de tiu ĉi internacia lingvo. Interesan prelegon je temo „Esperanto en la praktiko“ havis mgr. Borys Strelczyk. S-ano Julian Jarecki tre bele deklamis poemojn de Teltmajer kaj Konopaicka. Provlecionon laŭ ĉe — metodo faris

s-ano Halina Weinsteinówna Partoprenis 75 personoj. Dum la „Vespere“ oni parolis pri Stokholma Kongreso kaj propagandis ĝin. La 26. XI. 1933 oni komencis en ejo de P. T. K. maĝgrandan kurson por komencantoj. Laŭ ĉe metodo gvidas s-ano H. Weinsteinówna. La 9. XII. 1933 dank' al klopodoj de mgr. Arkadiusz Mirkowicz okazis en gimnazio (por plenkreskuloj) de Salingier prelego de mgr. Borys Strelczyk je temo: „Lingvo internacia kaj ĝia signifo“. Partoprenis ĉirkaŭ 90 personoj. — La 4. X. 1933 oni legalizis Varsovian Esperantistan Societon (Leszno 56. loĝ. 9, telef. 120685, ĉiutage krom sabatoj h. 20—22). Fakta agado komenciĝis en novembro. 2 kursojn por 75 komencantoj gvidas s-anoj J. Dratwer kaj M. Guterman. Ĉiumarde estas klubaj vesperoj. Ĝis nun

parolis. s-anoj: E. Wiesenfeld pri „Adam Zakrzewski”, A. Hartman — „Laborista Esperanta movado”, A. Darguzański „Esperanta movado en provinco kaj ĉefurbo”. S-ano M. Płoński legis fragmentojn de si tradukita komedio. —

La 10. XII. 33 prelegis M. Guterman je temo: „Problemo de la lingvo internacia” (pollingva prelego okaze de la

Unua Esperanta Semajno en Varsovio). Por riĉigi la kason okazis tri danc-vesperoj. Provizoran Estraron formas: I. Dratwer — prezidanto, red. M. Guterman — vicprezidanto, adv. A. Wundheiler — ĝen. sekretario, ing. M. Płoński — kasisto, red. O. Berman kaj H. Tejchner — estraranoj).

ESPERANTO-KARAVANO AL STOCKHOLM.

Kiel ni jam en la oktobra n-o de „Pola Esperantisto” konatigis, Pollanda Esperanto-Delegitaro (P. E. D.) klopodas organizi malmultekostan ekskurson al la nunjara Stockholma Kongreso. Niaj klopodoj celas havigi al ĉiuj partoprenantoj de la Kongreso rabatitan travojaĝon de koncerna limstacio tra Polujo ĝis pola marhaveno en Gdynia (konsideru: kelkcentkilometra distanco!), senpagan pasportan vizon ev. partoprenon en la Tutpola Esperanta Kongreso en Gdynia, okazonta tuj antaŭ tiu en Stockholm, malkaran travojaĝon de Gdynia al Stockholm kaj reen, kompletan vi-

tenon, loĝadon ktp. sur la ŝipo dum la tuta Kongreso.

Komencante tiujn klopodojn ni esperas havigi al Samideanoj el multaj landoj tre malmultekostan, senzorgan kaj komfortan vojaĝon al la Kongreso kaj partoprenon en ĝi. Por atentigi kiel eble plej multajn samideanojn pri tiu eksterordinara kaj profitdona okazo, ni kore petas diskonigi tiun informon per esperanta kaj nacilingva gazetaro. Pluajn informojn ni donos en plej proksima tempo! Anoncu vin jam tuj!

Ekzekutiva Komitato de P. E. D.
Kraków, Lubicz 34.

R A D I O.

Ni prezentas Esperanto-programon de polaj Radiostacioj por 5 monatoj. La prelegoj okazados merkrede ĉiu-du-semajne je la 22 h. kaj daŭros ĝis la 22 h. 20 m. En tiu tempo estas ankalkulita 5-minuta „Radiokesto”, dum kiu oni respondas diversajn demandojn kaj konatigas gravajn informojn. Eventuala plifruigo aŭ plipostigo de sendotempo estas nur tiam ebla, se okazos komuna dissendo de Eŭropa stacio aŭ ia tre grava dissendo enlanda. Komence de februaro ricevos ĉiuj iam ajnaj skribintoj al la polaj Radiostacioj presitan komunikon. Ni petas ĉiujn gazetojn kaj konsciajn Esp.-istojn diskonigi la programon, kaj instigi la aŭskultantojn, ke ili danku al Polshie Radio, Warszawa, por ke la rezulto de niaj prelegoj estu definitiva enhejmiĝo de Esperanto en niaj Radiostacioj.

Pollanda Esperanta Delegitaro, Kraków.
Lubicz 34.

7. II. Dro Jerzy Dobrzycki: Pola pentrarto.

21. II. Dro Marjan Tyrowicz: La gazeto en nuntempa Polujo.

7. III. Dro Adam Fischer, prof. de l' Univ. en Lwów: Karaktero de la pola popolo.

21. III. F-ino Zofja Zawiszanka: Pri Marŝalo Piłsudski.

4. IV. Dro Kazimierz Ajdukiewicz: Pola filozofia penso.

18. IV. Dro Rudolf Weigel: Laboratorio por kontraŭbatali la infektajn malsanojn.

2. V. Dro Stanisław Łempicki: Pola spirita kulturo en la lasta jarcentkvarono.

16. V. Dro Walery Goetel: Rezervoj kaj naciaj parkoj en Polujo.

30. V. Dro F. Burdecki: Polaj inventoj.

13. VI. Prof. Rudolf Wacek: Somero en Pollando.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.
OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACJO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

KONTO P. K. O. NR. 406.000

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.
ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—